

## Enhavo

1	Pasintaj konferencoj .....	2
1.1	Lingvo-politika Simpozio pri Lingvo kaj Ekskludo, majo 2015.....	2
1.2	Lingva simpozio pri celoj por daŭripova evoluigo, aprile 2016 .....	3
1.2.1	La simpozio .....	3
1.2.2	Konkludoj .....	5
1.3	Honora kolokvo por <i>Detlev Blanke</i> okaze de lia 75-jariĝo ( <i>Cyril Brosch</i> ). 8	
2	El Universitatoj kaj Altlernejoj .....	7
2.1	Buchanan-Majstroklaso, 16-a – 18-a de marto 2016, Centro Foresight, Universitato de Liverpolo, Britio ( <i>Angela Tellier</i> ) .....	8
2.2	Diplomigaj kaj doktorigaj disertacioj defenditaj inter 1973-2011 ĉe la interlingvistika fakto de Universitato Eötvös Lóránd (ELTE) Budapeŝt ( <i>Ivan Bujdosó</i> ) .....	10
2.2.1	Diplomigaj disertacioj.....	11
2.2.2	Netrovitaj dosieroj, sed menciitaj en Horváthova Terézia (2005).....	18
2.2.3	Hungarlingvaj doktorigaj disertacioj.....	22
2.3	Esperanto-Kursoj en Universitatoj. ....	22
2.3.1	EAQUALS: Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato de Krakovo ( <i>Maria Majerczak</i> ) .....	23
2.3.2	Universitato de Innsbruck: Esperanto – Lingvo kaj sistemo ( <i>Bernhard Tuidler</i> ) .....	24
2.3.3	Kurso en la Universitato de Kostariko ( <i>Antonio Leoni</i> ) .....	24
2.4	Magistra disertacio de <i>Irene Caligatri</i> kiel libro .....	25
2.5	<i>Interlinguistica Tartuensis</i> 10 en preparo .....	25
3	En Vieno: <i>Ulrich Lins</i> pri “Rudolf Carnap kiel Esperantisto” .....	25
4	Persona bibliografio de <i>Gerhard F. Strasser</i> ( <i>Reinhard Haupenthal</i> ) .....	26
4.1	Biografiaj informoj .....	26
4.2	Bibliografio .....	26
5	Response to Reinhard Haupenthal’s review of “Esperanto and its Rivals” ( <i>Roberto Garvía</i> ) .....	29
6	Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto ( <i>Bernhard Pabst</i> )..	32
7	<i>Michel Duc Goninaz</i> (1933-2016) .....	32

# 1 Pasintaj konferencoj

## 1.1 Lingvo-politika Simpozio pri Lingvo kaj Ekskludo, majo 2015

Antaŭ pli ol unu jaro, la 7-an de majo 2015, sepdeko da diplomatoj, UN-oficistoj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, universitatoj kaj membroj de la ĝenerala publiko renkontiĝis en Novjorko por partopreni Simpozion pri Lingvo kaj Ekskludo organizitan de la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

La simpozio estis dediĉita al la memoro de la konata socilingvisto kaj politikologo Joshua Fishman, kiu forpasis du monatojn pli frue. *Prof. Ofelia García*, de la Urba Universitato de Novjorko, omaĝis al li en enkonduka parolado. Ankaŭ prezentis enkondukajn komentojn *prof. Esther Schor* (Princeton University).

La ĉefparoladon prezentis internacie konata profesoro pri juro *Fernand de Varennnes*, kies temo estis: “Nefinita kaj Defia Taskaro: Lingvo, ekskludo kaj homaj rajtoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj.” Jen listo de la aliaj referaĵoj:

Lisa Atalians, Birkbeck, University of London, Britio. *Retara modelo de lingvopolitiko kaj lingva planado: Unuiĝintaj Nacioj kiel studobjekto.*

Mekki Elbadri, Arablingva Tradukservo, Unuiĝintaj Nacioj. *Internaciaj organizaĵoj sin ligas al universitataj institucioj sur la kampo de tradukado kaj interpretado.*

Rosemary Salomone, St. John’s University, Novjorkio, Usono. *La multlingvisma tagordo de Eŭropo fronte al la angla lingvo: Retoriko, realo, kaj lingva justeco.*

Zhiguo Zhang, Ŝanhaja Marista Universitato, Ĉinio, kaj University of Maryland, Usono. *Aspektoj de lingvopolitiko en internaciaj organizaĵoj: Sur la scenejo de la unua stadio de tutmondiĝo.*

Thomas Cooper, Universitato Esterházy Károly, Eger, Hungario. *Lingvaj hegemonioj kaj imperiismoj de valoro.*

Zeena Zakharia, University of Massachusetts Boston, MA., Usono. *Lingvo, konflikto kaj ekskludo: Observoj el edukado en kunteksto de afliktitaj de konflikto.*

Izadora Xavier, Université Paris 8 (Vincennes-Seine), Francio. *Knaboj estos knaboj: Maskleco kaj militista packonservado de UN.*

Jenny L. Meier, Usona Armeo, Fort Benning, Georgio, Usono. *La rolo de la "lingvotablo" en internacia packonservado.*

José Manuel Ferreira, Lancaster University, Britio. *La diskursa konstruo de legitimado en la UN-Misio en Haitio (2004-2014).*

Kurt Müller, National Defense University, Washington, DC., Usono. *Duarangaj lingvoj en multflanka milita packonservado kaj stabiligo.*

Nkonko Kamwangamalu, Howard University, Washington, DC., Usono. *Lingvo, eduko kaj evoluigo en Afriko: La argumento por patrinlingva edukado.*

Birna Arnbjörnsdóttir, Universitato de Islando, kaj Patricia Prinz, Mercy College, NY, Usono. *La anglalingva fendo: Malegalo kaj ekskludo en la universitata medio.*

Alisher Aldashev, Kazakh British Technical University, Kazahio. *La ekonomikaj repagoj al lingvokapablo kaj dulingvismo.*

Fermajn komentojn prezentis la konata specialisto pri lingvoplanado Björn Jernudd, kaj la direktoro de CED Humphrey Tonkin.

***La Studogrupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj estas grupo de universitatanoj kaj profesiuloj, kiuj interesiĝas pri:***

- *kiel la lingvopolitiko de Unuiĝintaj Nacioj funkcias en la realo,*
- *kiel homoj ĉe UN uzas lingvojn kaj faras elektojn inter lingvoj, kaj*
- *kiel UN mem komunikas lingve kun homoj ekster la organizaĵo mem.*

## **1.2 Lingva simpozio pri celoj por daŭripova evoluigo, aprile 2016**

### **1.2.1 La simpozio**

„Lingvo kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo“ (CDE) estis la temo de simpozio okazinta ĉe 777 United Nations Plaza, Novjorko, la 21-an kaj 22-an de aprilo. Pli ol cent universitatanoj, diplomatoj, reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj (NROj), kaj UN-oficistoj ĉeestis la aranĝon, kiu ekzamenis la lingvajn implicojn de la Celoj, starigitaj de la Ĝenerala Asembleo de UN kiel bazo de la laborprogramo de UN pri evoluigo dum la periodo 2015-2030.

Ĉefparolis *Suzanne Romaine*, eksa profesoro pri la angla lingvo ĉe Oksforda Universitato. *Michael Ten-Pow*, Speciala Konsilanto al la Kunordiganto de Multlingvismo ĉe UN, priskribis sian agadon por la antaŭenigo kaj konservado de multlingvismo ene de Unuiĝintaj Nacioj mem.

Oni organizis la simpozion por substreki la gravecon de lingvo kiel ilo de komunikado de la Celoj al ĉiuj popoloj de la mondo, kaj kiel elemento en la sukcesa realigo de la Celoj mem. Aludante al la kvara Celo, pri altkvalita edukado, *Timothy Reagan*, de la Universitato de Majno (Maine), rimarkigis, ke, “estas interese noti, ke, spite al la kerneco de lingvaj demandoj en tiu ĉi Celo kaj aliaj, la lingvoj ne eksplicite menciigas ie ajn inter la Celoj mem, nek en esprimo de la celtabuloj atingendaj por realigi la Celojn.” “Malgraŭ siaj imponaj celpunktoj,” aldonis *profesoro Romaine*, el Oksforda Universitato, la CDE “tamen ne agnoskas la centran rolon de la lingvo en la tutmonda debato pri malriĉo, daŭripovo, kaj justeco.”

La simpozio traktis la lingvojn ne nur kiel elementojn en la unuopaj Celoj, sed ankaŭ kiel ilojn por komuniki la Celojn kaj dialogadi kun multlingva mondo. Oni emfazis la gravecon de dudirekta komunikado, kiun ĉiu homo povu plene partopreni.

Inter la referantoj estis *Katalin Buzasi*, de la Amsterdama Universitato; *Terrence G. Wiley* (Centro por Aplika Lingvistiko, Vaŝingtono); *Kurt Müller* (Nacidefenda Universitato, Vaŝingtono); *Lisa McEntee-Atalianis* (Birkbeck, Londona Universitato, Britio); *Theo Du Plessis* (Universitato de la Libera Ŝtato, Sud-Afriko); *Carol Benson* (Instruista Kolegio, Universitato Columbia, Novjorko), *Dragana Radosavljevic* (Universitato de Grenviĉo, Britio); *Francis M. Hult* (Lunda Universitato, Svedio); *Alison Phipps* (Glasgova Universitato, Britio); kaj *María Barros* kaj *Anna García Álvarez*, de la Hispana Traduka Servo ĉe UN. Prezentojn faris reprezentantoj de NROj World Education (Monda Edukado), Save the Children (Savu la Infanojn), International Rescue Committee (Internacia Sava Komitato), RTI International, SIL International, International Network for Public Schools (Reto por Internaciaj Lernantoj en Publikaj Lernejoj), Linguapax International, kaj UN Academic Impact (Akademia Efiko UN).

Ankaŭ partoprenis per konkludaj vortoj *Seán Ó Riain*, irlanda diplomato kaj esperantisto.

“Edukado estas ŝlosila en sukcesigo de postkoloniaj evoluigaj iniciatoj por elimini ekonomiajn kaj sociajn malegalecojn,” deklaris *Rosemary Salomone*, profesoro pri juro ĉe St. John’s University. “Kaj la aliaj CDE estas egale gravaj lingve,” aldonis *Humphrey Tonkin*, de la Universitato de Hartford, prezidanto de la simpozio; “Kiel oni povas atingi egalecan traktadon antaŭ la leĝaro, aŭ enloĝeblajn urbojn, aŭ eĉ tutmondan kunordigitan agadon por elradikigi malsanon aŭ liveri puran akvon, se la homoj ne povas kunparoli kaj kunlabori pere de lingvoj kiujn ili ĉiuj komprenas?”

La simpozianoj ĝenerale interkonsentis, ke oni devas dediĉi pli da atento al la lingvo en formulado kaj plenumado de la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Dum la

specialistoj pri evoluigo eble flue parolas la anglan, multaj el la homoj, kiujn ili celas servadi, scipovas neniujn el la ĉefaj mondaj lingvoj.

La simpozio estis kunvokita de la „Studgrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj“, neformale organizita grupo de universitatanoj kaj praktikantoj.

Ĝi okazis sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio, organizaĵo en kunlaboraj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN kaj ties Fako pri Publika Informado, kaj de la Centro por Aplika Lingvistiko, kune kun la Centro pri Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj ties revuo *LPLP* (Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado). Subvenciis ĝin Esperantic Studies Foundation.

(Kontakto: [tonkin@hartford.edu](mailto:tonkin@hartford.edu))

### **1.2.2 Konkludoj**

La Studgrupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, sendependa grupo de esplorantoj kaj praktikantoj pri demandoj lingvorilataj, kunvokis simpozion pri Lingvo kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo, ĉe la Preĝeja Centro por Unuiĝintaj Nacioj, 777 United Nations Plaza, Novjorko, la 21-an kaj 22-an de aprilo 2016. Ĝi celis ekzameni la gravecon de lingvaj demandoj en la formulado, disvolvigo kaj sukcesa kompletigo de la Celoj. La ĉi-sekva dokumento redonas kelkajn ĝeneralajn konkludojn de la simpozio.

### **Superrigardo**

La 25-an de septembro 2015, mondaj gvidantoj aprobis kompletan de 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE), por alfronti la radikajn kaŭzojn de malriĉo, malegaleco, kaj degradiĝo de la homa medio. Kreskanta interesiĝo pri la CDE levis ilian tutmondan videblon, sed la celtabuloj kaj realigaj strategioj de multaj el la Celoj restas neklaraj. Sen plia klareco, la tutmondaj partneradoj antaŭvidataj en Celo 17 kaj fundamentaj al realigo de la CDE ne povos sukcesi. Tiuj partneradoj postulas justan kaj multdirektan komunikadon, kiu en si mem devas enplekti lingvajn aspektojn. Fakte, ĉiu CDE kunfrontiĝas kun lingvoj, ĉu kiel substanca elemento en la Celo mem (lingvo kiel celo) ĉu kiel ilo de komunikado, dialogo, respondo kaj realigo (lingvo kiel ilo).

La dominado de certaj lingvoj, precipe la angla, en internacia evoluiga diskurso, kreas ian iluzion de unuigita tutmonda strebado. Fakte, tiu dominado plivastigis la fendon inter la angleparolantaj elitoj kiuj esploras, pridiskutas kaj verkas gvidliniojn, kaj la miliardoj da homoj kiujn oni alvokas al plenumo de la gvidlinioj je individua nivelo. Dialogo tendencas al unu direkto: de la planantoj

al la priplanataj. Ofte, malsameco de lingvo malpermesas dialogon en spirito de reciprokeco kaj egaleco inter la planantoj kaj la popolo. Tiu ĉi Simpozio pri Lingvo kaj la CDE celis atentigi pri tiu fendo.

La sekvaj konkludoj, kiuj reprezentas larĝan interkonsenton de la pli ol 100 ĉeestintoj – diplomatoj, UN-stabanoj, esplorantoj kaj praktikantoj – substrekas *la urĝan bezonon inkluzivi la lingvan dimension en la planada, realiga kaj pritaksa stadioj de ĉiuj el la CDE.*

## **A. Lingvo kiel celo**

### ***1. Lingvaj rajtoj – Rajtoj al edukado***

La centra pozicio de edukado en la esperata sukcesa realigo de ĉiuj CDE emfaziĝas en Celo 4 (‘Garantii inkluzivan kaj bonkvalitan edukadon al ĉiuj homoj’); tamen nek la celo nek ĝiaj celtabuloj aserteble alfrontas la rolon de la lingvo en liverado de inkluziva edukado. Specife, se la lingvoj, kiujn la lernantoj parolas kaj komprenas bone, ne estas uzataj kiel lingvoj de instruado, la lernantoj ne ricevas aliron al la studprogramo, nek al bonkvalitaj instruado kaj lerneblecoj. *Lingve konscia eduka politiko*, ekzemple altkvalita multlingva edukado, bazita je la patrina lingvo, devas adoptiĝi se Celo 4 estu sukcese realigata kaj pritaksata. Nur tiam, egaleca edukado povus formi la fundamenton por realigi ĉiujn aliajn CDE.

### ***2. Lingvaj demandoj en dislokitaj homgrupoj***

En multaj mondopartoj, la migrado de neplenaĝuloj kies formala edukado estis interrompita atingis krizajn proporciojn. Tiu kresko devas esti kerna zorgo por ajna tutmonda strategio pri daŭripova evoluigo ĉar ĝi troviĝas ĉe la kruciĝo de migrado, edukado, lingvopolitiko, junulara evoluigo kaj malegaleco. Tamen, multaj formantoj de politiko daŭrigas sian laboron sub la supozo, ke rompoj al formala edukado, ĉu tempaj, lokaj aŭ lingvaj, nur konsistigas esceptojn al la normo. Se oni konsideras la tutmondan fluon de migrantoj kaj rifuĝintoj, nur sistema kaj ampleksa reanalizo de edukaj politikoj, *inkluzive lingvajn politikojn*, permesos al edukaj sistemoj, ke ili taŭge traktu dislokitajn studentojn kaj faciligu ilian postan produktivan reintegrigon en la socion.

### ***3. Lingvaj konsideroj kaj ideologioj – Socia problemo***

Lingvoj estas kunvolvigitaj kun demandoj de ideologio kaj identeco: ili ne neŭtralas. Enkorpigo de lingvoj en la planadan, realigan kaj pritaksan stadiojn de la CDE postulas rekonon, ke lingvaj konsideroj ne estas divideblaj disde sociaj

ideologioj kaj potenco. *Desupraj lingvaj politikoj ofte neglektas engaĝi individuajn membrojn de la socio*, kies fundaj motivoj kaj pensoformoj finfine determinos la rezultojn de realigado de politikoj. Eĉ bone esploritaj kaj bonintencaj politikoj, kiel ekzemple patrinlingve bazita multlingva edukado, povas nutri sociajn antaŭjuĝojn kaj misperceptojn, se ekzemple komunumoj, prave aŭ malprave, identigas difinitajn patrinlingvajn politikojn kun liverado de subnivela aŭ marĝeniga edukado. Eble necesos ne nur politika ŝanĝiĝo, sed socia ŝanĝiĝo, por aliancigi politikfarantojn kaj ordinarajn individuojn por atingi la CDE.

## **B. Lingvo kiel ilo**

### **4. Lingvo je institucia nivelo – En Unuiĝintaj Nacioj kaj pluen**

Utiligante interlingvojn kaj selektajn multlingvajn politikojn, institucioj atingis tutmondajn nivelojn de kunlaboro en esploroj kaj politikfarado. Tamen, tio ofte okazis koste de marĝenigo de ŝlosilaj partoprenantoj. Ĉiuj atingoj ankaŭ kaŝas la realon de tutmonda multlingvismo – la tagaltaga sperto de tiuj ĉe la plej suba nivelo. *Engaĝiĝo kaj aŭtenta dialogo postulas rekonon de lingva diverseco.*

La lingvo ne rajtas fariĝi ia politika aldono frontita nur dum la realiga stadio: ĝi estu integra parto de la dekomencaj esploroj kaj politika planado.

La instituciaj politikoj kaj reguloj de UN rilate multlingvismon montras eksplicitan sindediĉon al multlingva praktiko, kiu rekonas la lingvojn kiel kernan valoron kaj kiel fundamentan al ĝia laboro.

Sed montriĝis malfacile integri kaj obeigi tiujn politikojn. UN devas plue konsideri kiel plej bone transdoni la CDE en lingvoj kaj per komunikiloj kiuj kapablas atingi la tutmondan loĝantaron kaj eligi konstruan respondon.

### **5. Lingvaj rajtoj: La jura sistemo**

Juraj sistemoj, kiuj devigas individuojn interagi kun polico, kortumoj kaj karceraj sistemoj per majoritata aŭ registara lingvo rompas precize la rajtojn, kiujn la CDE celas apliki. Celo 16 (‘Antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj’) implicas, ke daŭripova evoluigo devas enkadrigi la protekton kaj aplikon de la fundamentaj rajtoj de la individuo – rajtoj garantiataj al la individuoj laŭ Artikolo 2 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj *senkonsidere al la lingvoj, kiujn ili parolas.*

Sekve, lingvaj servoj, kiel ekzemple akredititaj tradukistoj kaj interpretistoj, devas esti je dispono, tiel ke la ŝarĝo de ĝusta, sendiskriminacia kaj kuntekste taŭga komunikado ne trudiĝu al jam senrajtigitaj parolantoj de minoritataj aŭ fremdaj lingvoj.

### 1.3 Honora kolokvo por *Detlev Blanke* okaze de lia 75-jariĝo

La 30-an de Majo 2016 en la Universitato de Lepsiko kunvenis, parte alveturinte de malproksime, pli ol tridek kolegoj, amikoj kaj familianoj de *Detlev Blanke*, por honori lin okaze de lia naskiĝtaga datreveno per omaĝoj kaj fakprelegoj. La kolokvon organizis *Gesellschaft für Interlinguistik* (Societo pri interlingvistiko, GIL), sub la energia gvido de la prezidantino Sabine Fiedler (Lepsiko).

D. Blanke ekde 2011 estas honora prezidanto de GIL (li kunfondis la organizaĵon kaj gvidis ĝin de 1991-2010). Danke al la kunlaboro de lia edzino Wera, Detlev Blanke surpriziĝis per la evento, kiu estis sukcese kaŝita ĝis la lasta momento. Post la bonvenigo de la ĉeestantoj fare de *Sabine Fiedler*, *Cyril Brosch* (Univ. de Lepsiko) skizis la sciencan biografion de Blanke, kion sekvis prezento de ties multaj novaj publikigaĵoj<sup>1</sup> (depost la apero de lia dua festlibro en 2011), denove fare de Fiedler. Pervideajn bondezirojn el Novjorko sendis *Ulrich Becker*, eldonisto kaj longjara membro de GIL.

La faka programo konsistis el jenaj germanlingvaj prelegoj (po 45 minutoj):

- Prof. D-ro Michael D. Gordin (Princeton Univ., nuntempe gastanta en Berlino): *Gloro (tiel) transit: Max Talmey kaj la Einstein-a lingvo*
- D-ro Cyril Brosch (Univ. de Lepsiko): *Kiel malsamas parolata kaj skribata Esperanto(j)?*
- Prof. D-ro Sabine Fiedler (Univ. de Lepsiko): *Lingvafrankaa komunikado – ĉu vere okazo de 'neredemando'?*
- Prof. D-ro Klaus Schubert (Univ. de Hildesheim): *Rondiro tra prilaboritaj lingvoj*
- La prelegon de Prof. D-ro Heidemarie Salevsky (Altlernejo Magdeburg-Stendal): *Justeco – decidiga problemo (ĝis hodiaŭ)?*, kiu pro malsaniĝo ne povis partopreni, laŭtleĝis la filino de Detlev Blanke, *Katrin Blanke*.

Post la programo d-ro *Detlev Blanke* dankis al ĉiuj ĉeestantoj pro la kortuŝa kaj fake altnivela surprizo.

Post kafoservo, la tre sukcesan kunvenon finis unuhora ĉiĉeronado tra Lepsiko, akompanata de bela sunbrilo.

*Cyril Brosch*

## 2 El Universitatoj kaj Altlernejoj

### 2.1 Buchanan-Majstroklaso 16a - 18a de marto 2016, Centro Foresight, Universitato de Liverpolo, Britio

En 1930 *d-ro John Buchanan* testamentis la sumon de £4 000 al la *Universitato de Liverpolo*, kio ebligis starigi fonduson por disvastigi kaj instrui Esperanton.

---

<sup>1</sup> Vidu: Ulrich Becker (red., 2011): *Interlingvistiko kaj Esperantologio*. Bibliografio de la publikaĵoj de Detlev Blanke. Kun dulingvaj enkondukoj kaj indeksoj. New York: Mondial, 234 p., poste ĝis la nuntempo vidu: <http://blanke-interlinguistik.de/eo/publikajoj.html>.



En 2014 la universitato, kunlabore kun Esperanto-Asocio de Britio, daŭrigis la 85-jaran – sed ne seninterrompan – tradicion kaj okazigis la unuan tritagan Buchanan-Majstroklason ĉe luksa universitata konferencejo. Samloke ĉi-jare okazis la dua. Tiuj ĉi majstroklasoj estas intensaj studseminarioj, celantaj ne nur esperantistojn sed ankaŭ ne-esperantistojn, ekz. universitatajn studentojn kaj membrojn de la publiko, kiuj volas lerni iom pri Esperanto, ĝiaj lingvo kaj kulturo.

La programo estis riĉa kaj varia. Paralele okazis tri fadenoj kaj partoprenantoj povis, se ili deziris, pendoli inter ĉiuj tri.

La fadeno *esperanto-kulturo* celis diskutigi, kunlaborigi kaj kunkpensigi spertajn esperantistojn, kaj gvidis po kvar sesiojn pri esperantaj vivo kaj kulturo *profesoroj Duncan Charters kaj Renato Corsetti*.

Kontraŭe, la fadeno *esperanta literaturo* celis esence anglalingvanojn. Pere de la angla lingvo, *d-ro Paul Gubbins* prezentis kaj diskutigis tradukitajn specimenajn tekstojn el sia dulingva antologio „Star in a Night Sky“.

Komplemente, *profesoro Wim Jansen* pritraktis dum kvar sesioj *tiklajn aspektojn de la gramatiko de Esperanto* surbaze de ekzemploj el tekstoj uzataj en la literaturaj seminarioj. Ankaŭ ĉi tiu kursfadeno estis en la angla, sed esperantistoj estis kompreneble bonvenaj.

La tria kursfadeno celis komencantojn kaj post-komencantojn. Ĝin gvidis *Anna Löwenstein*, membro de la Akademio de Esperanto kaj aŭtoro de la romanoj „La ŝtona urbo“ kaj „Morto de artisto“. Ŝi instruis per propra ilustrita materialo bazita sur la libro „Esperanto by Direct Method“ de *Stano Marček*.

Aldone, kaj aparte por studentoj de la hispana ĉe la Universitato de Liverpolo (sed ne nur) *profesoro Charters* prelegis en la angla pri la rolo de Esperanto en la hispanaj literaturo kaj vivo.

### **Konkludaj rimarkoj**

Partoprenis entute 52 homoj, kaj ni plene atingis niajn du celojn: (1) plifirmigi rilatojn kun la universitato de Liverpolo, kaj (2) prezenti nin kiel seriozaj profesiuloj indaj je universitata atento egala al tio kiun ricevas aliaj lingvoj.

La kursaro ja rikoltis universitatan (nemovadan) admiron pro sia elstara nivelo. Skribis post la evento, *Profesoro Chris Harris*, estro de la fako “modernaj lingvoj kaj kulturoj” en la Universitato de Liverpolo:

“La dediĉo de Liverpolo al Esperanto, kaj do al universala komunikiĝo trans ĉiuj landlimoj en tempo de monda konflikto, havas egan gravecon laŭ rilatoj kulturaj, etikaj, intelektaj kaj humanaj. La Liverpola Esperanto-tradicio estas longa kaj respektata kaj datiĝas de Buchanan, Collinson kaj aliaj. Estas al mi fonto de fiero kaj plezuro, ke kiel fakestro mi havis la privilegion labori kun

[la Buchanan-komitato: Angela Tellier, Paul Gubbins, kaj la Buchanan-  
lektoro, Wim Jansen] ... . Vi produktis unuaklasajn prelegojn, pionirajn ligojn  
al niaj aliaj lingvaj kaj kulturaj studokampoj, instruadon de nivelo kiel eble  
plej alta, jaran majstroklason kiu allogas pliiĝajn nombrojn da lokaj kaj  
internaciaj partoprenantoj, novajn eldonaĵojn, stipendiopetojn, kaj plu. Kaj do  
mi ne diras jenon bagatele aŭ sen serioza pripensado: la intervenoj kaj  
kontribuoj, kiujn vi trioje faris kaj ankoraŭ faras, havas historian signifon en  
kaj trans tiu tradicio. La krea renoviĝo kaj energia revigliĝo de Liverpola  
esperantismo atestas pri viaj profunda sperteco, ekzemplodona dediĉo kaj  
kolosaj penoj tra etendita kaj daŭranta tempoperiodo. Mi proponas al vi miajn  
sinceran kaj plej koran admiron kaj gratulojn pro viaj atingoj, krom ĉia  
bondeziro por la venontaj evolupaŝoj, kiam mia estreco proksimiĝas al sia  
fino. Mia subteno, tamen, ĉiam restas.”

Surbaze de la seminarioj en 2014 kaj en 2016 estas preparata universitat-nivela  
kurslibro pri Esperanto.

Pri pli da informoj pri la majstroklaso, kaj pri studoj kaj esploroj uzante  
Esperanton vidu: [www.esperantoresearch.org.uk](http://www.esperantoresearch.org.uk)

*D-rino Angela Tellier* (redakte koncizigita)

(La kompleta kaj detala raporto pri la aranĝo riceveblas ĉe [angela@tellier.co.uk](mailto:angela@tellier.co.uk))

## **2.2 Diplomigaj kaj doktorigaj disertacioj defenditaj inter 1973-2011 ĉe la interlingvistika fakto de Universitato Eötvös Lóránd (ELTE), Budapeŝto**

*Iván Bujdosó*

Post multjaraj sensukcesaj provoj akiri plenan liston de la studofinaj laboraĵoj, kiujn pretigis  
finantoj de oficiala studado de interlingvistiko kaj esperantologio en ELTE, finfine *d-ro Iván  
Bujdosó* sukcesis trovi en aparta ŝranko ĉiujn laboraĵojn, kiuj estis defenditaj ekde 1973 en la  
tempo de *docento d-ro István Szerdahelyi* (1924-1984) kaj liaj posteulinoj (siatempo) *d-rinoj  
Zsuzsa Varga Haszonits* kaj *Ilona Koutny*. Temas pri neimageble granda temaro traktita en la  
studofinaj laboraĵoj diverskategoriaj.

La Esperanto-Fakto unue troviĝis en la kadro de la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata  
Lingvistiko“ (1966-2001) kaj poste en la sama, sed alinoma „Katedro Aplikata Lingvistiko“  
(2001-2011) de Filologia Fakultato de Sciencuniversitato Eötvös Lóránd (ELTE), Budapeŝto  
(Red.)

La universitatnivela fakto estis nuligita la 13-an de julio en 2001. Samtempe (en  
la sama registara dekreto) estis starigita altlernejnivela Esperanto-fakto. Ambaŭ  
konstruoj vivis ĝis la lasta studento finis la fakon.

En 2006 ĉiuj ĝistiamaj faktoj nuligis pro la transiro al la Bologna-sistemo. En tiu  
ĉi nova sistemo Esperanto estis kiel 50 kreditpoenta, 180 studhora specialiĝo ene  
de la hungara ĉefa fakto. Kun la katedrestro ni laboris pri ĝi dum 3 jaroj. La  
katedrestro nature zorgis ankaŭ pri sia ĉefa fakto aplikata lingvistiko. Tiu nova  
sistemo (ĉefaj faktoj kaj ĉ. 40 specialiĝoj) ekestis per la oficiala anonco de la  
registro.

En la unua duono de februaro en 2006 la dekano de la Filologia Fakultato kunvokis ĉiujn (profesoroj, docentoj, adjunktoj, profesor-asistantoj) kaj laŭtlegis tiujn fakojn kaj specialiĝojn, je kiuj la studentoj enskribiĝsi. Li anoncis ĉiujn fakojn kaj specialiĝojn krom Esperanto-specialiĝo. En la lastaj tagoj de junio li vokis min kaj ordonis al mi, ke mi pensiuliĝu, ĉar ja ne estos novaj studentoj en la Esperanto-specialiĝo .

Laŭ tiu ĉi fakto oni povas diri, ke la Esperanto-fako ĉesis en 2006 kaj la ĝin anstataŭunta Esperanto-specialiĝo neniam efektiviĝis pro la dekana politiko.

### **Klarigoj:**

Aŭtoro. Originala titolo. Alilingva titolo. Paĝonombro+nombro de aldonajoj.  
Gvidanto/Prijuĝanto sekvas ĉe la fino. Vidu la mallongigojn (- mankas indiko).  
La nomoj estas laŭ la hungara (kaj japana kaj korea) ordo  
La ciferoj indikas la paĝo-amplekson de la laboraĵo.

#### Mallongigoj de la gvidantoj/prijuĝantoj pri la studofinaj laboraĵoj:

SZI Szerdahelyi István

KI Koutny Ilona

VHVS Varga Haszonits Zsuzsa

BZS Barcsay Zsuzsa

MÁ Máthé Árpád

BI Bujdosó Iván

\*\* La teksto de la laboraĵo estas hungarlingva. Ĉiuj aliaj tekstoj estis verkitaj en Esperanto.

### **2.2.1 Diplomigaj disertacioj**

#### **1973**

*Inguszné Barabás Rita.* Lingvistikaj indicoj de esperantaj stilkategorioj surbaze de leksikometria materialo. Az eszperantó stíluskategóriák nyelvészeti értékei lexikometriai anyag alapján. 30+15. SZI

*Jovanović, Ružica.* La rolo de slavoĵ en interlingvistiko. A szlávok szerepe az interlingvisztikában. 63. SZI

*Čorokalo, Bosiljka.* Slavaj elementoj en Esperanto (Surbaze de la Zamenhofa tradukaĵo de Revizoro (Gogol)). Szláv elemek az eszperantóban. Zamenhof Revizor fordítása alapján. 95. SZI

#### **1975**

*Balogh Judit.* La esperantlingva terminologio de programita instruado. A programozott oktatás terminológiája eszperantó nyelven. 14. SZI

*Simon Lajosné Babits Anna.* Az eszperantó mint fedőszerv az illegális munkásmozgalomban. Esperanto kiel kaŝa organizo en la ilegala sindikata movado. 39. SZI.\*\*

*Barcsay Zsuzsa.* Verba regado kun prepozicio en Esperanto kaj la ekvivalentaj formoj en la hungara. Előljárós igevonzatok az eszperantóban és a magyar megfelelőik. 49. SZI

*Cserne Tibor. János Zsilka:* La dialektiko de la lingvaj movformoj, traduko de la I-a ĉapitro. Zsilka János: A nyelvi mozgásformák dialektikkája I. fejezetének fordítása. 50. SZI

*Nagy Katalin.* Lingvo kaj stilevoluaj tendencoj en Esperanto en la spegulo de du tradukoj de "La tragedio de l'homo". Nyelv- és stílusfejlődési tendenciák az eszperantóban "Az ember tragédiája" két fordításának tükrében. 54. SZI

*Bodnár Erzsébet.* Ekzameno de spontanee asociitaj vortgrupoj el la Esperanto-lingva vorttrezoro de la gelernantoj baze de l' internacia eksperimento . Spontán asszociatív szócsoportok vizsgálata a tanulók eszperantó nyelvi szókincsében a nemzetközi kísérlet felmérési anyagának alapján. 58. SZI

*Besenyei Anna.* Analizado de leksika materialo surbaze de PDE (La Hungarlanda modelo). Egy nemzetközi kísérlet anyagának elemzése orosz és eszperantó korpuszon. 110. SZI

## **1976**

*Király Ildikó.* La poezi-arto de Julio Baghy. Baghy Gyula költői művészete. 57. SZI

## **1977**

*Sirkó Ilona.* Interferaj fenomenoj inter hungara kaj esperanta lingvoj laŭ esperantlingvaj laboraĵoj de hungaraj gelernantoj. A magyar és eszperantó nyelv közötti interferencia magyar anyanyelvű tanulók eszperantó nyelven írt dolgozatai alapján. 55. SZI

## **1978**

*Kristensen, Leif.* Prilaboro kaj analizo de la manuskripto "Optegnelser til en Pasigraphie" de Rasmus Rask, kio temas pri la teorio de la artefarita lingvo. Rasmus Rask a mesterséges nyelv elméletéről szóló "Optegnelser til en Pasigraphie" című kéziratának feldolgozása és elemzése. 95. SZI

## **1979**

*Baharev, Darin.* La funkcioj de la artikolo en Esperanto. A névelő funkciói az eszperantóban. 61. SZI

## 1980

*Vittay Katalin.* La funkcioj de la propozicioj "de" kaj "da" kompare al iliaj ekvivalentoj en la angla, franca kaj hungara lingvoj surbaze de la tradukaĵoj de "La tragedio de l'homo" de Imre Madách. A DE és a DA prepozíciók, illetve azok angol, francia és magyar megfelelői funkcióinak vizsgálata Madách Imre "Az ember tragédiájá"-nak fordításai alapján. 50. SZI

*Német József.* La hungara literaturo en Esperanto-traduko. A magyar irodalom eszperantó fordításban. 55+25. SZI

*Páva József.* La filozofia lingvo de Kalmár György. Kalmár György filozófiai nyelve. 56. SZI

*Daróczi Béla.* Bibliografio de Imre Baranyai EMBA. Baranyai Imre (EMBA) életrajza. 61. SZI

*Szabó Anna.* Interlingvistikaj rilatoj de SZÓCSINTAN de Pál Bugát. Bugát Pál Szócsintánának interlingvisztikai vonatkozásai. 67. SZI

*Stand László.* La intonacio en Esperanto. Az eszperantó intonáció. 104. SZI

*Révész Sándor.* Elementaj vortstrukturoj en Esperanto (La metodo de vortmodela analizo en elementa kombinologio). Elemi szóstruktúrák az eszperantóban. A modelláló szóelemzés módszere az elemi kombinációelméletben. 128. SZI

*Hompaszné Horváth Judit.* La apero kaj disvastiĝo de Ido-movado en Hungario. Az IDO-mozgalom megjelenése és elterjedése Magyarországon. 75+20. SZI

## 1981

*Császár Gyula.* Terminologio geometria de Cirill Vörös. Vörös Cirill geometriai terminológiája. 25. SZI

## 1984

*Horváth József.* Analizo de frazeologioj en "La tragedio de l'homo". Plurlingva komparo. Frazeologiai szókapsolatok elemzése "Az ember tragédiája" drámában. Többsnyelvű konfrontáció . 29. SZI

*Dr. Wacháné Schiller Judit.* Eĥo de artefaritaj lingvoj en lingvistikaj kaj ceteraj revuoj en la jardekoj ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo. A mesterséges nyelvek visszhangja a magyar nyelvészeti és egyéb folyóiratokban a századforduló körüli évtizedekben. 32. SZI

*Pétervári Tamás.* La penso de la muzika lingvo en la interlingvistiko kaj en la utopisma literaturo. A zenei nyelv gondolata az interlingvisztikában és az utopisztikus irodalomban. 72. SZI

*Főző Mária.* Zoologiaj terminoj de la Universala Vortaro. Az egyetemes szótár állattani terminusai. 88. SZI

*Szemők Balázs.* La nomigoj de la familianoj kaj parencoj en Esperanto (La kompletigo de ĉi tiuj nomigoj). A családtagok és rokonok elnevezése az eszperantóban. Ezen elnevezések kiegészítése. 94. SZI

*Prunkl János.* Vivo kaj laborado de Ábel Barabás. Barabás Ábel élete és munkássága. 114. SZI

### **1986**

*Lendvay Csaba.* La idea evoluo de la Esperanta junularo en la lastaj jardekoj. Az ifjúsági eszperantó mozgalom ideologiai tendenciái az utóbbi évtizedekben. 34. SZI

*Engel Mária.* Jelentéstani elemzések. Semantikaj analizoj. 57. Dr. Zsilka János.\*\*

*Szolnok Péter.* Problemoj de lingvaj baroj en la scienco kaj teknika disvolviĝo. Nyelvi akadályok nehézségei a tudomány és technika elterjedésben. 57. SZI

### **1988**

*Kisfaludy Katalin.* Apliko de sintezita parolo en la perkomputila instruado de Esperanto. A beszéd-szintézis alkalmazása az eszperantó nyelv számítógépes oktatásában. 110. KI

### **1989**

*Havasi József Zoltánné.* Otto Jespersen kaj la internacia lingvo. Otto Jespersen és a nemzetközi nyelv. 35. VHZS

*Nyilas Éva.* Edmont Privat. Edmont Privat. 35. VHZS

*Dr. Máthé Árpád.* Szemelvények a magyar és az eszperantó kémiai szaknyelv diakron vizsgálatából. Fragmentoj el la esploro de hungara kaj Esperanta kemiaj faklingvoj. 43. Dr. Horváth Katalin.\*\*

*Bartha Emma.* Apliko de komputiloj en la instru-lernada procezo. Számítógépek alkalmazása a tanítás-tanulás folyamatában. 53. KI

*Csiszár Zsuzsanna.* Lingvistikaj skoloj kaj artefaritaj lingvoj. Nyelvészeti iskolák és a mesterséges nyelvek. 56. VHZS

*Bodnár Éva.* Verkaro kaj literaturaj verkoj de Jean Forge. Jean Forge irodalmi munkássága. 67. -

*Sereghyné Zengő Enikő.* Rolo de la diversaj instruiloj kaj metodoj en la fremdlingva instruado (Esperanto) por 4-6 jaraj infanoj. A különböző eszközök és módszerek szerepe a 4-6 éves gyerekek idegennyelvű (eszperantó) oktatásában. 87. BZS

*Balla Károly.* Esploro de la Esperanta leksiko (konsidere de la eŭropaj lingvoj). Az eszperantó nyelv szókészletének vizsgálata, tekintettel az európai nyelvekre. 215. -

## **1990**

*Smidéliusz Kálmánné.* Kvinlingva pedagogia terminaro. Ötnyelvű pedagógiai szakszótár. 5+ 137. KI

*Kisdéry Zoltán.* Esperanto en la sciencoj. Eszperantó a tudományokban. 39. KI

*Simon Margit.* Komparado de sintaksaj strukturoj en Esperanto kaj en la itala surbaze de tradukaĵoj de hungaraj beletraĵ verkoj. Szintaktikai struktúrák összehasonlítása az eszperantóban és olaszban, magyar szépirodalmi művek fordításai alapján. 56. KI

## **1992**

*Mézes Gyöngyi.* Komparaj esploroj de kampoteorioj en la hungara kaj Esperanto studante la sinonimojn de la vorto "dio". Mezőelméleti kontrasztív vizsgálatok az eszperantóban és a magyarban az "isten" szó szinonímáinak egybevetésével. 32. Dr. Horváth Katalin

*Rados Péter András.* A Literatura Mondo és a Nyugat. Literatura Mondo kaj la hungara perioda ĵo Nyugat. 34. Szabó Imre.\*\*

*Mikola Klára.* La Esperanta kanto - Pri verkado kaj tradukado de kantotekstoj. Az eszperantó ének - Énekszövegek alkotása és fordítása. 50. Szabó Imre

*Flender György.* Parolcentra eksperimenta lingvoinstruado en urbo Sarkad, apliko de komputilo en instruado de Esperanto. Beszédközpontú kísérleti nyelvtanítás Sarkadon, a számítógép alkalmazása az eszperantó oktatásában. 54. KI

*Gábor Gyuláné.* Mi ellernos Esperanton. Lernmaterialo de 90 instruhoroj por gimnazianoj en la 3a jaro de Esperanto-lernado antaŭ la mezgrada ŝtata fremdlingva ekzameno aŭ abiturienta ekzameno. Megtanulunk eszperantóul. 19 óra anyaga 3. éve tanuló, középfokú nyelvvizsgára készülő gimnázistának. 12+13-288. BZS

## 1993

*Bujdosó Iván.* Helyesírási rendszerek számítógépes átalakítása hangzó formává. Perkomputila transformo de ortografia teksto al fonetika teksto.10. Dr. Bolla Kálmán.\*\*

*Farukuoye, Helga.* Metodika analizo de koresponda Esperanto-kurso por niĝerianoj. Nigériaiaiak által használt eszperantó levelező tanfolyami anyagok módszertani elemzése. 36. 72. BZS

*Westerhoff, Bernhard.* La kontaktoj inter la movadoj Esperantaj kaj bahaa kiel ili speguliĝas en la Esperantaj periodaĵoj. Az eszperantó és a bahaa mozgalom közötti kapcsolatok tükröződése az eszperantó periodikákban. 37. MÁ

*Csonka Ida.* A kreol nyelvek. A nyelvkeveredés jelenségétől a Papiamentóig. La kreolaj lingvoj. De la fenomeno de lingvomiksado al Papiamento. 48+49-63. VHZS.\*\*

*Dörr, Josef.* Baza vortprovizo de Esperanto cele al instruado. Oktatás-orientált eszperantó alapszókincs. 112+113-176. KI

## 1994

*Bíró Zsanett.* Detektivromanoj en la Esperanta literaturo. Detektívregények az eszperantó irodalomban. 41. VHZS

*Kocsiné Sződy Karolina.* Nova koncepto pri la internacia lingvo: Unitario. Új elképzelés a nemzetközi nyelvről: az unitario. 63+ 64-75. VHZS

*Kocsiné Sződy Karolina.* Új elképzelés a nemzetközi nyelvről: az unitario. Nova koncepto pri la internacia lingvo: Unitario. 63+64-75. VHZS.\*\*

*Ikai Yosikazu.* Semantika naturismo en la unua volapuka leksiko. Jelentéstani naturalizmus az első volapük lexikában. 74. -

## 1996

*Horváth Gabriella.* Analizado de la periodaĵo IPR kaj indeksoj de ĝiaj jarkolektoj 1-25 (1970-1995). Az Internacia Pedagogia Revuo eszperantó periodika tartalmi elemzése és az 1.-25. évfolyamok (1970-1995) indexei. 20+21-104. BZS

*Turčenko, Lidia.* Evoluo de la lingvo Esperanto kaj ties problemoj. Az eszperantó fejlődése és fejlődésének problémái. 31. VHZS

*Szemők Balázs.* Újrakezdés a magyar eszperantó mozgalomban (1955-1960). Rekomenco en la hungara Esperanto-movado 1955-1960. 40. Horváth Péter ELTE Tanárképző Főiskolai Kar.\*\*



*Hevesiné Molnár Anikó.* Matematikaj terminoj en Esperanto, specife en geometrio. Matematikaj kifejezések az eszperantóban, specifikusan a geometriában. 46. -

*Dupin, Stéphane.* Interlingua kaj la problemo de la internacia lingvo. Az interlingua és a nemzetközi nyelv problémája. 59. -

*Choi Daesuk.* Historio de Esperanto-periodaĵoj en Koreio. A koreai eszperantó periodikák története. 62. MÁ

*Gregory-Zielinski, Michelle.* Porinfana literaturo en Esperanto. Gyermekirodalom az eszperantóban. 74. 12. -

### **1997**

*Papp Mónika.* Natur- kaj mediprotektado kiel globala problemo en la Esperanta-gazetaro. Természet- és környezetvédelem mint globális probléma az eszperantó sajtóban. 50. MÁ

*Papp Mónika.* Természet- és környezetvédelem mint globális probléma az eszperantó sajtóban. Natur- kaj mediprotektado kiel globala problemo en la Esperanta-gazetaro. 50. MÁ.\*\*

*Luczywo, Marian.* La kontribuaĵo de poloj por la evoluo de Esperanta literaturo en la unua periodo. A lengyelek hozzájárulása az eszperantó irodalom fejlődéséhez az első korszakban. 112. VHZS

### **1998**

*Ratajczak, Katarzyna.* Didaktike strukturita krestomatío de la kvara klaso de gimnazioj laŭ studprogramo de la Ministerio pri Edukado kaj Kulturo en Hungario. Didaktikusan felépített szöveggyűjtemény a gimnáziumok negyedik évfolyama számára a minisztérium által kiadott tanterv alapján. 32. VHZS

*Tötösné Gados Zsuzsa.* D-ro István Szerdahelyi 1924-1987. Dr. Szerdahelyi István 1924-1987. 60. VHZS

*Buzás Ildikó.* Komparo de Esperanto, Ido kaj Hipersigno, nova lingvoprojekto. Az eszperantó az IDO és egy új nyelvtervezet, a hipersigno összehasonlítása. 65. VHZS

*Bölcskei Andrea.* Fonto: rolo, enhavo kaj verkistoj. Fonto ("Forrás"): szerep, tartalom és szerzők. 119. MÁ

### **2002**

*Salomonné Csiszár Pálma.* Prefiksitaĵaj verboj en Esperanto. Prefixumos igék az eszperantóban. 50. Wacha Balázs

## 2003

*Marsi Mónika.* Eblecoj de la media edukado en instruado de Esperanto. A környezeti nevelés lehetőségei az eszperantó oktatásában. 42+9. BI

*Szücsné Tóth Mária.* Literatura legolibro (de Zamenhof ĝis la eldonejo Stafeto). Irodalmi olvasókönyv I. (Zamenhoftól a Stafeto kiadóig). 51. VHZS

*Berényi Csilla.* Esperanto en Interreto. Eszperantó az interneten. 53+22. BI

## 2005

*Horváthová Terézia.* Az ELTE eszperantó nyelv és irodalom szakjának története. Historio de la fakó pri Esperanta lingvistiko kaj literaturo en ELTE. 56. VHZS.\*\*

*Csiszár Gábor.* Movada gvidilo pri Budapeŝto. Budapest eszperantó emlékhelyei. 58. MÁ

## 2009

*Kiss László Péter.* La kritika trarigardo de la sonsistemo de la lingvo Esperanto. Az eszperantó hangrendszerének kritikai vizsgálata. 43. VHZS

## 2011

*Király Anna.* Analizo de la romano La verda koro de Julio Baghy. Baghy Gyula La verda koro című regényének elemzése. 50. VHZS

## sen dato

*Mirbaghian, Morteza.* Tipologio de Esperanto. Eszperantó tipologia. 53. VHZS

### 2.2.2 Netrovitaj dosieroj, sed menciitaj en *Horváthová Terézia (2005)*

## 1971

*Szabó Mária Rózsa.* A középiskolai második idegennyelvi tankönyvek lexikai anyagának az eszperantóhoz viszonyított vizsgálata.

(Komparo de la leksiko de Esperanto kaj tiu de la studlibroj de la dua fremda lingvo en mezlernejoj)

## 1975

*Gyarmathy Zsolt.* Földrajzi nevek vizsgálata az eszperantóban. Kísérlet az egységes eszperantó terminológiára.

(Esploro de la geografiaj nomoj en Esperanto. Provo por unuecigi la terminologion en Esperanto)

## 1976

*Balogh Ferenc.* A birtoklás tanításának problémái a párhuzamosan tanított eszperantó és orosz nyelvben.

(La problemoj de instruado de la posedado, se Esperanto kaj rusa lingvo estas samtempe instruataj)

*Szabó Mária Rózsa.* Fejezetek a második anyanyelv fejlődéstörténetéből.

(Ĉapitroj el la evoluo de la dua gepatra lingvo)

## 1977

*Ehmann Beáta.* Szatmári Sándor élete és művei.

(La vivo kaj verkoj de Sándor Szatmári)

*Koutny Ilona.* Nagy matematikusok és a nyelvi modellálás.

(Grandaj matematikistoj kaj la lingva modelado)

## 1979

*Bödei Ágota.* A filozófiai nyelvtervezetek és a könyvtári tizedes osztályozó rendszer.

(La filozofiaj lingvoprojektoj kaj la biblioteka dekuma sistemo)

*Mickiewicz Alicja.* Archaizmusok elemzése Sylvester Heyden 4-nyelvű társalgás gyűjteménye alapján, különösen figyelembe véve az eszperantó archaizmusok szövegeit.

(Arkaismoj en la kvarlingva konversacia libro de Sylvester Heyden kaj arkaismoj en Esperanto)

## 1980

*Barna Zoltán.* Magyarországi Eszperantista Munkások Egysülete (1913-1934).

(Hungarlanda Eszperantista Laborista Ligo (1913-1934))

*Csiszár Ernő.* Pszicholingvisztikai megfigyelések kétnyelvű magyar-eszperantó gyerekeknél (Psikolingvaj fenomenoj ĉe hungaraj denaskaj infanoj)

*Forrai Miklós.* Az eszperantó stilisztikai vázlata.

(Trarigardo de la Esperanto-stilistiko)

*Gerencsér Attila.* Mondattípusok az eszperantóban.

(Fraztipoj en Esperanto)

*Mezeiné Soós Éva.* Karinthy és az eszperantó. (Karinthy kaj Esperanto)

*Molnár Ágnes.* Gáti István élete és művei (1749-1843).

(La vivo kaj verkoj de István Gáti)

*Prunkl Jánosné Vinicska Mária. Réthy András "Lingva Universalis"-ának elemzése. (Analizo de „Lingva Universalis” de András Réthy)*

*Sámson László. Magyar tanulók nyelvtani hibái az eszperantóban. (Gramatikaj eraroj de la hungaraj lernantoj en Esperanto)*

## **1982**

*Merényi Kalotai Judit. Az első sikeresen működő világnyelv, a Volapuk 100 éves (1879-1979).*

*(La unua sukceso funkciaanta mondolingvo, Volapuko estas cent jara (1879-1979))*

*Varga-Haszonits Zsuzsanna. A naturalista irányzat az interlingvisztikában. (La naturalisma tendenco en la interlingvistiko)*

## **1984**

*Cser Roxane. A XX. Század nyelvészeti terminológiája eszperantó nyelven. (La Esperanta lingvistika terminologio de la 20-a jarcento)*

*Molnár Ágnes. Gáti István általános nyelvészetről szóló művei. (Ĝenerallingvistikaj verkoj de István Gáti)*

*Sereghyné Zengő Enikő. Sasu Károly interlingvisztikai nézetei. (Interlingvistikaj opinioj de Károly Sasu)*

*Szabó Imre. Faktitívus és kauzatívus az eszperantóban. (Faktitivo kaj kaŭzativo en Esperanto)*

## **1985**

*Páva József. A tartani igének szemantikai elemzése összevetve a magyar és francia megfelelőekkel.*

*(Semantika komparo de la verbo 'teni' kun la ekvivalentoj hungara kaj franca)*

## **1986**

*Pap Zsuzsanna. Az antonímák a logikában és az eszperantóban. (Antinomoj en la logiko kaj en Esperanto)*

*Varga Katalin. Frazelogia a mesterséges nyelvben. (Frazeologio en artefarita lingvo)*

## **1989**

*Décsi Ágnes. Archaizmusok a Zamenhof szövegekben. (Arkaismoj en la tekstoj de Zamenhof)*

*Gajdos Pál. Giesswein Sándor az eszperantó mozgalomban. (Sándor Giesswein en la Esperanto-movado)*

**1990**

*Stróbl Katalin.* Kommunikatív módszer alkalmazása az eszperantó tanításában magyar szépirodalmi lapján fordításai.

(Komunikada metodo en la instruado de Esperanto surbaze de tradukoj de beletraj verkoj)

**1991**

*Tóth Andrea.* Nyelv-szociológiai vizsgálatok a magyar eszperantó irodalomban.

(Lingvosociologiaj esploroj en la Esperanto-literaturo far hungaroj)

**1992**

*Nagy Edit.* Nyelv-szociológiai vizsgálatok a magyar eszperantó irodalomban.

(Lingvo-sociologiaj esploroj en la hungara Esperanto-literaturo)

**1993**

*Mirska, Esperantina.* Budaörsi iskolai kísérlet.

(Lerneja eksperimento en Budaörs)

**1994**

*Makay Mariann.* Nyelvelemzésen alapuló intelligens program kidolgozása az eszperantó céljára.

(Ellaboro de inteligenta programo bazita sur lingvoanalizo por Esperanto)

**1995**

*Gönye Anikó.* Az iskolai eszperantó oktatás története Magyarországon.

(La historio de la lerneja Esperanto-instruado en Hungario)

*Smidéliusz Kálmánné.* Az eszperantó nyelv propedeutikus szerepe az olasz nyelvet tanuló magyar gyerekek képzésében.

(Propedeŭdika valoro de Esperanto en la edukado de hungaraj infanoj, kiuj lernas la italan)

**1999**

*Bosnyák Eszter Ilona.* Literarura Foiro ("Irodalmi Vásár"): szerep, tartalom és szerzők. (Literatura Foiro: rolo, enhavo kaj verkistoj)

**2002**

*Golden Dániel Lariko.* Negyedik korszak? Az eszperantó irodalom a kilencvenes években.

(Ĉu kvara epoko? La Esperanto-literaturo en la naŭdekaj jaroj)

*Sánta Erzsébet.* Hasonlóságok és eltérések az eszperantó és a nemzeti nyelvek közmondásaiban és szólásaiban.

(Similecoj kaj malsimilecoj en la proverboj kaj diraĵoj en Esperanto kaj en la naciaj lingvoj)

## 2.2.3 Hungarlingvaj doktorigaj disertacioj

**1979**

*Balogh Judit.* Hídnnyelvi rendszerek szerepe az idegen nyelvek oktatásában. La rolo de pontolingvaj sistemoj en la instruado de fremdaj lingvoj. 183. -, \*\*

**1981**

*Sakaguchi Alicja.* A nyelvi anyag modellálása az idegen nyelvi oktatásban és az interlingvisztikában. La modeligo de la lingva materialo en la fremdlingva metodologio kaj interlingvistiko. 166. dr. Szerdahelyi István, dr. Balázs János egyetemi tanár. doktriga, aparte en hungara kaj en Esperanto.\*\*

**1985**

*Sámson László.* Az eszperantó FARI ige jelentése összevetve a magyar (tesz, csinál) igék jelentésével. Komparo de verbo FARI kun la la signifo de la hungaraj vortoj 'tesz, csinál'. 161. -.\*\*

**1988**

*Szemők Balázs.* A fogászati szaknyelv fejlődése a magyar nyelvben és kifejlesztése az eszperantóban. La evoluo de la dentista terminologio en la hungara kaj ĝia evoluigo en Esperanto. 172.-.\*\*

**1990**

*Koutny Ilona.* Gépi beszédelőállítás és alkalmazása a magyar és az eszperantó számítógépes oktatásban. Produktado de maŝina parolo kaj ĝia apliko en la perkomputila instruado de la hungara kaj Esperanto. 70. Dr. Papp Ferenc.\*\*  
akadémikus (akademiano de la Hungara Scienca Akademio), Dr. Olaszky Gábor kandidátus (kandidato).

**2004**

*Bujdosó Iván.* Az eszperantó mint tervezett nyelv oktatása. Instruado de la planita lingvo Esperanto. 179. Dr. Geecső Tamás, Dr. Wacha Balázs. PhD-iga, legebla en Edukado.net.\*\*

## 2.3 Esperanto-Kursoj en Universitatoj

IpI kutime ne informas pri universitataj Esperanto-kursoj, pure lingvaj, kvankam ĝi konscias pri ties graveco.

Pri ĉiuspeca instruado de Esperanto devus okupiĝi **ILEI** (ankaŭ vidu [www.edukado.net](http://www.edukado.net))

IpI klopodas informi pri sciencaj aktivaĵoj en universitatoj kaj universitatsimilaj institucioj (altlernejoj ktp.), do pri oficialaj sciencaj prelegaroj aŭ unuopaj aranĝoj pri interlingvistiko/esperantologio, pri esploroj, studofinaj laboraĵoj (diplomlaboraĵoj, master-tezoj, doktorigaj disertacioj) ktp. Ĉi-sekve ni faras escepton. (Red.)

### 2.3.1 EAQUALS:

#### Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato de Krakovo

*Maria Majerczak*

La Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato ricevis internacian nemovadan kvalit-rekonon de EAQUALS.

#### Kio estas EQUALS?

La agado de tiu organizaĵo interesos esperantistojn de ĉiuj kontinentoj. EAQUALS (Evaluation and Accreditation of Quality Language Services) estas internacia organizaĵo pri plej altaj kvalit-normoj en instruado de fremdaj lingvoj. Ĝi estas registrita en Britio. EAQUALS konfirmas altan kvaliton de la instru-lerna procezo rigardata tutece, kiel instruado, ekzamenado, lernado kaj multaj aliaj gravaj elementoj ligitaj kun lingvoinstruado.

EAQUALS partoprenas en laboroj de la Konsilio de Eŭropo, ĝi ankaŭ estas konsultata de la Eŭropa Komisiono pri aferoj rilataj al lingva edukado.

En la *Jagelona Universitato de Krakovo* (JU) estas instruataj pli-malpli 10 fremdaj lingvoj, sed 11, inter ili Esperanto, estas plej larĝe disponigataj en la granda fremdlingva fakto de la universitato, kiu nomiĝas *Jagelona Lingva Centro*. Nur tiuj lingvoj celis (laŭ la rekomendo kaj kun forta apogo de la Rektoro) kaj akiris la Eaquals-kvaliton.

La E-instruado en JU havas oficialan statuson, tial la altegan koston de la akredito pagis, kompreneble, la universitato.

<https://www.eaquals.org/2016/05/09/jagiellonian-language-centre-in-krakow-joins-eaquals/>

#### La signifo por Pollando

La Jagelona Universitato estas la unua universitato en Pollando, kies lingvo-instruado ricevis tiun prestiĝan kvalit-markon. Tiu fakto malfermas la vojon al la fremdlingvaj faktoj de aliaj polaj universitatoj. Jam kelkaj petis ĉi-rilatan helpon de la Jagelona Universitato.

#### La graveco por Esperanto

- 1) Laŭ konataj dokumentoj, la Jagelona Universitato estas la sola mondscale (kaj verŝajne la unua) supera lernejo, kies E-instruado havas la internacian Eaquals-markon (de iom pli longa tempo slogano de la Jagelona Lingva Centro estas “Ni estas aliaj”). Esperanto troviĝas en la listo de la 30 lingvoj, kies instruado akiris ie en la mondo la prestiĝan Eaquals-kvaliton. Tio estas grava por E-o, ĉar montras, ke

- a) la lingvo povas esti traktata tute same, kiel aliaj, etnaj lingvoj, kaj ke
- b) ĝia instruado povas atingi saman, internacie rekonatan nivelon kiel la angla, germana k.a.

2) E-o estas pli facile akceptebla en internaciaj fakaj medioj, se proponas ĝin granda ŝtata universitato.

3) La fakto de internacia rekono de la E-instruado, bazita sur la plej modernaj normoj, kiu jam realiĝis en granda universitato, povas malfermi la vojon al movadaj institucioj instruantaj E-on.

La akiro de la internacia rekono de alta kvalito en lingvoinstruado estas konsiderata en la plej bona pola universitato kiel granda sukceso, kaj jam kelkajn monatojn daŭras festo...

La E-instruado en la Jagelona Universitato estas realigata de *Maria Majerczak*.

### **2.3.2 Universitato de Innsbruck: Esperanto - Lingvo kaj sistemo**

De la 20-a ĝis la 28-a de majo 2016 *Bernhard Tuidler* gvidis la aranĝon „Lingvo-kurso Esperanto: Lingvo kaj sistemo“ en la Leopold-Franzens-Universitato Innsbruck/Aŭstrio. La kurso enkondukis en la lingvon Esperanto, la gestudentoj – el Aŭstrio, Italio, Germanio kaj Svisio – lernis la gramatikon, esencan parton de la elementa vorttrezoro kaj ili ankaŭ ricevis bazan scion pri la strukturo de planlingvoj kaj pri la historio de la planlingva(j) movado(j).

La 22 gestudentoj – el la fakoj lingvistiko, tradukscienco kaj historio – tre pozitive trapasis la tri ekzamenojn de la kurso.

[https://orawww.uibk.ac.at/public/lfuonline\\_lv.details?sem\\_id\\_in=16S&lvnr\\_id\\_in=641056](https://orawww.uibk.ac.at/public/lfuonline_lv.details?sem_id_in=16S&lvnr_id_in=641056)  
bernhard.tuidler@onb.ac.at

### **2.3.3 Kurso en la Universitato de Kostariko**

En la Universitato de Kostariko (<http://www.ucr.ac.cr>), en la semestro de marto al junio, Esperanto estas instruata de *d-ro. Jorge Antonio Leoni de León* en la Fakoj pri Filologio, Lingvistiko kaj Literaturo (<http://filologia.ucr.ac.cr>). La partoprenantoj sekvas bazan E-kurson, elekteblan por bakalaŭraj gestudentoj. Ĝi valoras 3 kredit-unuojn. Jam de preskaŭ 20 jaroj la Internacia Lingvo estas instruata en la Universitato de Kostariko, kie, krome, kandidatoj je profesoreco rajtas ekzameniĝi pri ĝi por supreniri akademian kategorion. Ĉi-foje en la kurso enskribiĝis 12 studentoj. Ĉi-jare, la fakestrino pri Lingvistiko proponis Plenan Profesoron por gvidi la kurson, anstataŭ Honora Profesoro. Tio ĉi ne povas okazi ofte, sed signifas ke, por la unua fojo, la kurso estas komplete integrita en la buĝeto de la Fakoj pri Lingvistiko.

Informis: *Antonio Leoni*

Profesoro pri Komputika Lingvistiko, Universitato de Kostariko



## 2.4 Magistra disertacio de *Irene Caligaris* kiel libro

La sekva titolo, defendita kiel magistra disertacio, intertempe aperis kiel libro:

Caligaris, Irene (2015): *Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese. Una ricerca sul campo sulle identità esperantiste*. Torino: Università degli studi di Torino, Corso di Laurea in Scienze Linguistiche. Gvidanto: Prof. d-ro Federico Gobbo, 460 p.

## 2.5 *Interlinguistica Tartuensis* 10 en preparo

Oni intencas eldoni la 10-an volumon de la serio *Interlinguistica Tartuensis*, kiu aperas en la Universitato de Tartu:

En la ĉi-rilata Informletero n-ro 1 oni legas:

La Universitato de Tartu havas reformite ekde 01.01.2016 kvar sciencajn terenojn, kiuj konservis la erojn de la klasika universitato, (<http://www.ut.ee/en/about-us/new-statutes-university-tartu> ). Do, ni daŭrigas la eldonon de la scienca serio “*Interlinguistica Tartuensis*”, komencitan en 1982, (<http://dspace.utlib.ee> )

Estona Interlingvistika Asocio planas kune kun la universitata interlingvistaro eldoni la 10-an kajeron de “*Interlinguistica Tartuensis*”. Ĉi-foje ni ne donas temon, bonvenas studoj pri ajna temo, kiuj rilatas al la nuntempa kaj historia interlingvistiko.

Artikoloj estas preferataj en la *mondaj lingvoj* kiel angla, franca, germana, hispana, rusa kaj en la planlingvo Esperanto, kun 5–10 ŝlosilvortoj, ekz.: esperantologio – leksikologio kaj leksikografio – speciala terminologio.

*La optimala amplekso* estas ĉirkaŭ 10 paĝoj A4 kun eblaj ilustraĵoj, kolorfotoj kaj foto de la aŭtoro. La artikolojn oni sendu al la la asocia adreso, elektota sube.

La redakta komitato estimplene

*Aleksandr D. Duliĉenko*, prof em, [aleksd@list.ru](mailto:aleksd@list.ru)

*Enn Ernits*, doc, [ennernits@hotmail.ee](mailto:ennernits@hotmail.ee)

*Madis Linnamägi*, [forsel@hotmail.ee](mailto:forsel@hotmail.ee)

## 3 En Vieno: *Ulrich Lins* pri „*Rudolf Carnap* kiel Esperantisto“

La Universitato de Vieno (Fakultato pri Filozofio kaj Edukado) okazigis de 13.-15. Junio 2016 konferencon sub la temo „*Logischer Empirismus. Lebensreform und die deutsche Jugendbewegung*“ (Logical Empiricism, Life Reform, and the German Youth Movement; Logika Empiriismo, vivo-reformo kaj la germana junulara movado). Kadre de la konferenco *d-ro Ulrich Lins* prelegis pri la relative fortaj rilatoj de la fama germana filozofo *Rudolf Carnap* (1891-1970) al Esperanto.

## 4 Persona bibliografio de *Gerhard F. Strasser*

Kompilis *Reinhard Haupenthal*

Kvankam esperantologio kaj interlingvistiko ofte menciigas unu-spire, estus erare supozi, ke ili estas rezervejo de la (organizita) Esperanto-movado. Ekzistas ekzemploj por tio, ke interlingvistoj (kaj eĉ esperantologoj) realigas siajn esplorojn kaj publikigaĵojn en la ĝenerala mondo scienca kaj (bedaŭrinde) estas apenaŭ atentataj en Esperanto-rondoj.

Du nomojn ni menciuj kiel ekzemplon: tiun de la ĝermanisto *Frieder Sondermann* aktivantan en Japanujo kiu prezentis studojn pri pazigrafiaj temoj kaj *Prof. D-ro Gerhard F. Strasser*, emerita profesoro en Landshut.

Prof. Strasser disponigis la ĉi-sekvan biografieton. Listo de liaj tem-rilataj publikigaĵoj montras la interlingvistikajn fokusojn de lia publikiga aktiveco. Pri liaj ceteraj publikigaĵoj vd.: <http://www.personal.psu.edu/faculty/g/f/gfs1/>

### 4.1 Biografiaj informoj

*Gerhard F. Strasser* (\*1940) devenas el Landshut en Bavarujo kaj studis de 1959 ĝis 1965 anglistikon, amerikanistikon kaj romanistikon ĉe la universitatoj de Munkeno, Grenoblo kaj ĉe Rhodes College en Memphis, Tennessee. Post lia formiĝo kiel gimnazia instruisto dua Fulbright-stipendio lin venigis al Trinity College en Hartford, Connecticut. De 1969-1973 li akiris Ph.D. en komparistiko ĉe Brown University en Providence, Rhode Island. Post ses jaroj da instrua aktiveco en komparistiko kaj ĝermanistiko en Northwestern University en Evanston, Illinois, li instruis dum 25 jaroj ĉe The Pennsylvania State University en University Park, kie de 1997 ĝis 2001 li gvidis la sekcion por ĝermanistiko kaj slavistiko. Post sia emeritiĝo en 2004 li revenis al Bavarujo kaj plu dediĉas sin al sia esplor-aktiveco tre divers-kampa kiel universalaj lingvoj, kriptologio kaj mnemoniko de la Frua Nuntempo sur kiuj baziĝas aro da libro-publikigoj, kontribuoj al kolektivaj verkoj kaj mult-nombraj artikoloj.

### 4.2 Bibliografio

#### 1979

„Geheimschrift“.

En: Paul Raabe, Eckhardt Schinkel (Hrsg.): *Sammler, Fürst, Gelehrter: Herzog August zu Braunschweig und Lüneburg, 1579-1666*. Wolfenbüttel: Herzog-August-Bibl. 1970. 421 p., p. 181-191. (Ausstellungskataloge der Herzog-August-Bibliothek. 27.)

#### 1986

„Seventeenth-Century Catholic Attempts at Revitalizing Latin as a Universal Language.“

En: Humphrey Tonkin, Karen Johnson-Weiner (eds.): *The Idea of a Universal Language. Report on the Fourth Annual Conference of the Center for Research and Documentation on World Language Problems. New York, December 13-14, 1985.* New York: Center for Research and Documentation on World Language Problems 1986. 128 p., p. 55, 57-61.

### 1988

*Lingua Universalis. Kryptologie und Theorie der Universal Sprachen im 16. und 17. Jahrhundert.* Wiesbaden: Harrassowitz i. Komm. 1988. 291 p.  
(Wolfenbütteler Forschungen. 38.)

„La contribution d’Athanas Kircher à la tradition humaniste hiéroglyphique.“  
En: *XVIIe siècle.* Revue publiée par la Société du XVIIe siècle. Paris 40.  
1988: 1, p. 79-92.

### 1989

„Lingua realis, lingua universalis und lingua cryptologica. Analogiebildungen bei den Universal Sprachen des 16. und 17. Jahrhunderts.“  
En: *Berichte zur Wissenschaftsgeschichte.* Organ der Gesellschaft für Wissenschaftsgeschichte. Weinheim 12. 1989, p. 203-217.

### 1992

„Diplomatic Cryptology and Universal Languages in the Sixteenth and Seventeenth Centuries.“  
En: Keith Neilson, B. J. C. McKercher (eds.): *Go Spy the Land. Military Intelligence in History.* Westport, Connecticut; London: Praeger (1992). XIV, 208 p., p. 73-97.

### 1993

„Johann Joachim Bechers Universal Sprachenentwurf im Kontext seiner Zeit.“  
En: Gotthardt Frühsorge, Gerhard F. Strasser (Hrsg.): *Johann Joachim Becher (1635-1682).* Wiesbaden: Harrassowitz 1993. 238 p., p. 215-232.  
(Wolfenbütteler Arbeiten zur Barockforschung. 22.)

„Johannes Trithemius (1462-1516). Faithful Preserver of the Old and Bold Proponent of the New.“  
En: Clyde Lee Miller (ed.): *Old and New in the Fifteenth Century.* Binghamton, NY: State University of New York 1993. IV, 163 p., p. 153-163.  
(Acta. The Center for Medieval and Early Renaissance Studies. 18.)

### 1994

„Closed and Open Languages: Samuel Hartlib’s Involvement with Cryptology and Universal Languages.“  
En: Mark Greengrass, Michael Lislie, Timothy Raylor (eds.): *Samuel Hartlib and Universal Reformation. Studies in Intellectual Communication.*

Cambridge: University Press (1994). XIX, 372 p., p. 151-161.

### **1996**

„Science and Pseudoscience: Athanasius Kircher's *Mundus Subterraneus* and his *Scrutinium Pestis*“.

En: Gerhild Scholz Williams, Stephan K. Schindler (eds.): *Knowledge, Science and Literature in Early Modern Germany*. Chapel Hill, London: Univ. of Carolina Pr. 1996. 310 p., p. 219-240. (University of North Carolina at Chapel Hill: University of North Carolina Studies in the Germanic Languages and Literatures. 116.)

### **2003**

„Athanasius Kircher – Genie und Wagnis eines barocken Universalgelehrten.“

En: *Fuldaer Geschichtsblätter*. Zeitschrift des Fuldaer Geschichtsvereins. Fulda 79. 2003, p. 85-108.

### **2008**

„Zwischen Geheimcode und Weltsprache. Sprachentwürfe der Jesuiten im 17. Jahrhundert als Ersatz für Latein.“

En: *Der Sprachdienst*. Wiesbaden 52. 2008; 1, p. 1-16.

„Die europäische Rezeption der kryptologischen Werke Giovanni Battista Della Portas.“ En: *Morgen-Glantz*. Zeitschrift der Christian-Knorr-von-Rosenroth-Gesellschaft. Bern [u. a.] 18. 2008, p. 85-114.

### **2009**

„Die Tradierung von Wissen über Kryptographie und Universalsprachen zwischen Italien und Deutschland vom 16. bis zur Mitte des 17. Jahrhunderts.“

En: Emilio Bonfatti, Herbert Jaumann, Merio Scattola (Hrsg.): *Italien und Deutschland. Austauschbeziehungen in der gemeinsamen Gelehrtenkultur der Frühen Neuzeit*. Padova: Unipress 2009. 348 p., p. 139-184.

### **2011**

„Von der Lingua Adamica zur Lingua Universalis. Theorien über Ursprache und Universalsprachen in der Frühen Neuzeit.“

En: Herbert Jaumann (Hrsg.): *Diskurse der Gelehrtenkultur in der Frühen Neuzeit. Ein Handbuch*. Berlin, New York: de Gruyter 2011. XIII, 1054 p., p. 517-591.

### **2012**

„Ansätze zu internationaler Verständigung durch konstruierte Sprachen im 17. Jahrhundert.“

En: *Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt*. Begleitband zur Ausstellung an der Bayerischen Staatsbibliothek (14. Juni bis 9. September 2012).

(München): Allitera Verl., Bayerische Staatsbibl. (2012). 228 p., p. 33-61. (Bayerische Staatsbibliothek. Ausstellungskataloge. 85.)

## 2015

„Die Wissenschaft der Alphabete. Universalsprachen vom 16. bis zum frühen 19. Jahrhundert im Kontext von Kryptographie und Philosophie.“

En: Anne-Simone Rous, Martin Mulrow (Hrsg.): *Geheime Post: Kryptographie und Steganographie der diplomatischen Korrespondenz europäischer Höfe während der frühen Neuzeit*. Berlin: Duncker & Humblot 2015. 294 p., p. 41-72. (Historische Forschungen. 106.)

## 2016

„Lettres muettes“: Zu den frühen Zeugnissen über die orientalische Blumensprache, *Selam* genannt.“

En: Isabel Kranz, Alexander Schwan, Eike Wittrock (Hrsg.): *Floriographie: Die Sprachen der Blumen*, München: Fink 2016. 42 Seiten im Manuskript.

## 5 Response to Reinhard Haupenthal's review of „Esperanto and Its Rivals“

En IpI 96-97 (1-2/2016), p. 22-28, aperis kritika analizo de *Reinhard Haupenthal* de partoj de la libro „Esperanto and Its Rivals“ de *Roberto Garvía* (pri la libro vd. IpI 94-95, p. 15-16).

Estas kutimo doni al la kritikita aŭtoro la eblecon respondi. Tion ni faras, tamen escepte. Ne eblos en IpI daŭrigi la prezenton de pliaj vidpunktoj. Ĉiu mem formu al si vidpunkton pri la polemiko. (Red.)

*Roberto Garvía*

Among other research tools, natural scientists can conduct experiments to adjudicate between false and true. In social sciences we have a more difficult job. We basically draw on exiting theories that look promising, collect relevant data, and construct a narrative to see the extent to which that theory can provide us a better understanding of events. There are no litmus tests or critical experiments that help us find a final or near-final explanation of the phenomena we want to explain. We basically submit our research to our colleagues and the public, whose job is to evaluate whether the theoretical approach has proved useful or not, whether the methods used and the data employed are relevant or, on the contrary, if we have missed something that might turn out to be important for the argument, and so on. Critiques of this sort encourage further research, give impulse to new alternative narratives that challenge the state of the art, and help us make progress (see the classic Arthur C. Danto, *Narration and Knowledge*, Columbia U.P. 3rd edition, 2007). The point is that progress in social sciences basically depends on critical and honest evaluation.

I am sorry to say that I didn't find this in Reinhard Hauptenthal's 4-page review of my book: he trespasses the common, academic standards of intellectual honesty. He neglects to mention the new data and sources I use in my book; he doesn't evaluate whether the historical data I use in my research support my conclusions or not. He doesn't trouble himself to explain to the readers the theoretical approach I use, nor does he offer a clue that could help other researchers build competing, alternative explanations.

And this is done with lack of intellectual honesty. He simply misleads readers. For example, he accuses me of a "lapsus calamis" on the first page of his review, when he says I should have mentioned Idiom Neutral instead of Reform Neutral as I did, leading readers to think that I really don't know anything about the topic. But Hauptenthal is hiding from the readers that my reference to Reform Neutral relates to the period when Ido, already established, was confronting other minor contestants, among them Reform Neutral (for Couturat's view on this last version of Rosenberg' language, see Progreso, June, 1912, p. 256). Hauptenthal's review is abundant with misrepresentations of this sort. Another example: he tells readers that the beginning of the Esperanto movement cannot be explained without studying the interconnectedness between Esperantists and Volapükists, something which, he claims, I don't do ("RG tue dies nicht"). Again, this is not true. The open sentence of the last paragraph on p. 72 reads: "If the German ex-Volapükists were insignificant in numbers, they were crucial in others ways" to explain the first steps of Esperanto, which I explain further on in the book (pp. 72-75, see also p. 47 on the first conversions of Volapükists to Esperanto). Hauptenthal is simply providing misinformation to the readers and betraying the confidence of Ligilo/Interlinguistische Informationen's editorial board. I can point out some other examples, but it would be boring. For Hauptenthal, more important than being honest to his readers and the editorial board of Ligilo is to forward a list of typos and mistakes in the references list. Unable to make any substantial critique, and unwilling to show due intellectual respect to his readers, he devotes, I would say, 60-70 per cent of his review on these minutiae. For Hauptenthal, it is critical that I write "Theddaüs" on one page, and Thaddäus" on another one, but not to explain the theoretical framework of the book, the relevance of the sources, the soundness (or lack thereof) of the conclusions. Readers, it seems, don't deserve that.

What really bothered me was the exchange we had last year, which Hauptenthal partially reproduces in this review (and I wonder if the editorial board of Ligilo asked Hauptenthal if he had my authorization, which he actually didn't ask for, to make public our private exchanges). In one of his first emails, he blatantly accused me of finding the reference of Examen critique de la Langue Musicale Universelle directly from Wikipedia. Never in my academic life have I encountered such bad faith. I had to bury myself in my office and shuffle through thousands of photocopies to try to remember and unearth the article that had led me to that source. I found it: it was an article written in 1994 by Staller,

before Internet (not to mention Wikipedia) was launched. I referred it to him, and expected an apology, but received none. Moreover, he is still claiming in his review that I took that reference from Wikipedia. To substantiate it, he says that there is no reference in my book to Staller's article. But, again, he is lying to the readers: Staller article shows up in p. 180n2, as well as in the list of references. Lapsus calamis, unverzeihlicher ... Fehler, hanebuch. His language is patronizing and frivolous. I mention the Kulturkampf, but for Hauptenthal this is completely irrelevant. He spares telling the readers why I thought important to talk about it, how it fits into my argument, and whether that supports my conclusions or not.

Some readers might think that Hauptenthal's review and my response is the sort of usual skirmish among scholars that shows that the field is blooming with new insights and ideas, and that, correspondingly, Ligilo<sup>2</sup> is doing its job by helping them to have a better understanding of the theoretical and empirical issues involved. I don't think so. I think our exchange is a waste of time; a necessary one, though. It is a waste of time to be forced to remind someone else about the basic ethical and academic rules of intellectual honesty. Time will put Hauptenthal and my book in their respective places. But in the meantime, readers of Ligilo are left blind about the potential qualities and, needless to say, the potential shortcomings of my book, and this hinders progress in our knowledge of the topic discussed. It can be heard in some Esperantists circles that the worst enemies of Esperanto are the Esperantists. I wouldn't like to hear anything similar with reference to interlinguists. I think that we all have the responsibility to leave interlinguistics open to respectful and honest discussion. We have to be able to walk into the field accompanied by other scholars willing to honestly exchange theoretical approaches, ideas, sources, and constructive criticism. We should be able to walk in an open field, not a minefield where everything, including misrepresentations and lies, is legitimate.

Esperanto is a fascinating topic by itself. But it also has a tremendous potential to help us to understand contemporary societies. Inspired by Ana Velitchkova's dissertation, *Esperanto, Civility, and the Politics of Fellowship: A Cosmopolitan Movement from the Eastern European Periphery* (University of Notre Dame, 2014), I am thinking of doing a comprehensive research of the Esperanto movements in Franco's Spain in order to compare it with that of the former GDR –about which a substantial research has already been done under GIL's umbrella. This sort of research could help understand how civil society can survive or even flourish in the interstices of authoritarian regimes –a still underdeveloped topic in political science.

---

<sup>2</sup> Temas pri *Informilo por Interlingvistoj* (IpI)- Red.

## 6 **Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto**

*Bernhard Pabst*

Kiel oni diras en „ĝusta kaj bona’ Esperanto?“ – Plej multajn respondojn al tiu centra demando de instruado ni trovas en la verko „Fundamento de Esperanto“. Ĝia unua eldono estas de 1905, ĝia aktuala stato de 2007.

La Unua Parto de la Berlina Komentario (BK I) sisteme klarigas ĉiujn demandojn ĉirkaŭ la ĉefa normo de Esperanto pri „ĝusta“ kaj „bona“, troveblajn en la „Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo“, en la Antaŭparolo, Gramatiko kaj Ekzercaro de la Fundamento.

La Komentario plie enkondukas en la Akademiajn Korektojn kaj la Oficialajn Aldonojn kaj elmontras rolon kaj taskojn de la Akademio.

La „Dua Parto pri la Vortaro Oficiala“ (BK II) estas la plej kompleta kaj fidinda kolekto de ĉiuj oficialaj vortoj de Esperanto, la "Kvara Parto - Akademia Dokumentaro" (BK IV) - kvankam ankoraŭ ne kompleta - jam nun la plej ampleksa kolekto de decidoj, rekomendoj kaj konsiloj de la Lingva Komitato kaj Akademio de 1905 ĝis 2015, BK VII fine represo de la unua difin-vortaro, daŭre grava por kompreni kaj ĝuste interpreti la Fundamenton. Tiel ekestas plena sistema konsult-verko pri ĉiuj demandoj ĉirkaŭ la „lingvo-konstitucio“ de Esperanto. La volumoj kune estu utila helpilo por instruistoj, progresintaj lernantoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri ĝusta Esperanto. La volumoj estas formatitaj kiel libroj en la formato pdf.

[http://esperanto-](http://esperanto-akademio.wikispaces.com/Berlina+Komentario+pri+la+Fundamento+de+Esperanto)

[akademio.wikispaces.com/Berlina+Komentario+pri+la+Fundamento+de+Esperanto](http://esperanto-akademio.wikispaces.com/Berlina+Komentario+pri+la+Fundamento+de+Esperanto)

(Necesas substreki, ke la sendube valora materialo de B. Pabst ne estas ligita al la oficiala Akademio de Esperanto.- Red.)

## 7 **Michel Duc Goninaz (1933-2016)**

Michel DUC GONINAZ naskiĝis la 6-an de septembro 1933 en Parizo, mortis la 26-an de marto 2016. Li estis docento pri la rusa lingvo kaj Esperanto en la universitato de Aix-en-Provence (Francio) kaj franca esperantisto. Li estis la ĉefredaktanto de la nova *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* aperinta en 2002, plia eldono en 2005. Duc Goninaz ankaŭ multe tradukis el la franca kaj verkis multajn interlingvistikajn kaj esperantologiajn studojn. En IpI 68 (1/2009), p.27-31 aperis lia bibliografio. Ni perdis elstaran esperantologon.

---

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. [www.esperantic.org](http://www.esperantic.org). ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-23 92 59 79, [detlev@blanke-info.de](mailto:detlev@blanke-info.de). Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ KD. Artikoloj sen aparta indiko pri aŭtoreco kutime estas kompilitaj de la redaktoro. Represo kun fontindiko estas permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. IpI riceveblas senpage de UEA.

---